



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

15 dec 1974

Memoru pri la

Tago de la
Esperanto-Libro
Mendu jam nun
vian libron!

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 463649; 514269

N-ro 40/1974 - 22 nov 1974
Aperas ĉiusemajne

Esperanto kaj internacia sindikata movado

Nova hungara iniciato

Budapeŝto (pp) "Hungara Vivo" kaj la hungarlingva "Eszperantó Magazin" petis intervjuon de Sándor Gáspár, membro de la Politika Komitato de la Hungara Socialisma Laborista Partio, ĉefsekretario de la Landa Konsilio de la Sindikatoj kaj gvidanta persono en la internacia sindikata movado pri la demando, kiel la internacia sindikata movado povus utiligi la internacian lingvon.

La ampleksa kaj pozitiva intervjuo estas publikigita en Esperanto en numero 5 de "Hungara Vivo" kaj hungarlingve en numero 9 de "Eszperantó Magazin".

Jen kelkaj citaĵoj el la respondoj de Sándor Gáspár:

"Laŭ mia opinio Esperanto povus havi signifan rolon en la pli bona konigo de la vivo kaj sindikata movado de la diverslingvaj laboristoj. Ĉi povus grave helpi en tio, ke la lingvoproblemo estu malpli embarasa kaj fine estu solvita. Ĉi tio ĉiamaniere estas intereso de ĉiuj sindikatoj de la mondo, pri kia-ajn-landa sindikata movado temas."

"Tial ni estas pretaj kunlabori kun tiuj sindikatoj, laŭ kiuj Esperanto plifaciligus la interproksimiĝon, interkompreniĝon de la diverslingvaj sindikatoj kaj sindikatanoj."

Sándor Gáspár deklaris sin preta sur la internaciaj forumoj de la sindikatoj proponi la pridiskutadon de tiu grava problemo kaj eventuale ankaŭ fari rezolucion por la disvastigo de Esperanto inter la sindikatanoj-laboristoj. Je la demando, ĉu la hungara Landa Konsilio de Sindikatoj sin turnus al la Sindikata Mondligo kun la propono ke oni metu al tagordo ĉi tiun gravan internaciistan demandon, ĉefsekretario Gáspár respondis: "Jes. Mi pensas, ke la hungaraj sindikatoj, en konvena tempo, esprimus ĉe la Sindikata Mondligo, ke ili rigardas Esperanton kiel utilan lingvan helpon por reciproka interkonigo, por interŝanĝo de spertoj, por interproksimiĝo, por evoluigo de la interrilatoj."

Li ankaŭ ĝojus, se la Mondligo de Sindikatoj povus pri ĝi sukcese intertrakti kun la Internacia Ligo de Liberaj Sindikatoj. Laŭvorte li diris: "Precipe pro tio, ke la sindikatestroj en la kapitalismaj landoj pli kaj pli trovas necese krei interrilatojn ankaŭ kun la sindikatoj de la socialismaj landoj."

Tamen Sándor Gáspár opinias, ke estus oportune, se antaŭe UEA povus iniciati ĉe la internaciaj sindikataj centroj, ke ili okupiĝu pri Esperanto. "Kaj poste ni, hungaraj sindikatoj, pritraktinte la aferon ankaŭ kun la sindikatorganizaĵoj de aliaj landoj, povus akceli la sukceson de la iniciato," aldonis la sindikata ĉefsekretario.

Hungara Esperanto-Asocio jam informis la prezidanton de UEA, D-ro Tonkin, pri tiu iniciato, kaj supozeble la estraro de UEA baldaŭ traktos ĝin. En cirkulero Hungara Esperanto-Asocio ankaŭ informis la landajn asociojn kaj petis popularigi la intervjuon kaj lanĉi similan iniciaton en la koncernaj landoj.

Minaco al Londona Esperanto-Klubo

Londono (pp). La kunvenejo de la fama Londona Esperanto-Klubo, nome Fred Tallant Hall, 153 Drummond Street, Euston, London NW1 2PB, estas minacata fare de la lokaj instancoj por fari spacon por rekonstruo.

Anoj de la klubo timas, ke se tiu plano efektiviĝos la klubo ne ricevos similan kunvenejon por la sama kosto. Tiu povus signifi velkiĝon de la klubo pro kost-plialtiĝoj. La Londona Klubo fariĝis centro de Esperanto kiun vizitas multaj esperantistoj el ĉiuj mondpartoj ĉiujare, kaj tiun centron oni ne deziras perdi. Pro tio anoj de la klubo skribas al la lokaj instancoj por esprimi sian esperon ke la instancoj rekonsideru la planon.

Por ke la klubo povu daŭri skribu vian opinion al
S-ro B. H. Wilson, C.B.E., Town Clerk (Urbsekretario),
The Town Hall, London Borough of Camden,
Euston Road, London NW1 2RU, Britio.

Internaciaj feriaj kursoj en novaj manoj

Helsingoro (pp) S-ro L. Friis, Aabyhøj, la multjara gvidanto de la internaciaj feriaj kursoj de Helsingoro, informas:

"Post 43-jara aranĝado kaj gvidado de la internaciaj feriaj Esperanto-kursoj de Helsingoro, ni sentis, ke nun venis la tempo por retiri nin de tiu laboro.

Tial ni transdonis la aranĝon al komitato de kelkaj anoj de la Esperanto-klubo de Helsingoro kaj de la najbara klubo de Helsingborg.

La prezidanto de la komitato estas s-ro Gösta Persson, Helsingborg, la kasisto s-ino Inga Magnusson, Helsingborg, kaj la ĝenerala sekretario s-ino Eva Lankilde, Helsingoro.

Ni sincere ĝojas, ke tiel fervoraj kaj lertaj samideanoj kiel ili transprenos la laboron. Ĉiujn korespondaĵojn kaj petojn pri kursoprogramo bonvolu sendi al

S-ino Eva Lankilde, Ingemannsvej 18
DK-3000 Helsingør, Danlando "

Aldonindas, ke la venontaj feriaj kursoj okazos tuj antaŭ la UK en Kopenhago de la 20 - 26 jul 1975.

Ĉu nova Esperanto-strato?

Bad Hersfeld (pp) D-ro Kurt Goerke, estro de la Esperanto-Grupo Bad Hersfeld, per letero de la 13a de novembro 1974 petis la magistraton de la urbo Bad Hersfeld eknomi unu el la novaj loĝstratoj "Esperanto-strato". La Esperanto-Grupo Bad Hersfeld ĉiujare fariĝas 25jara.

Zamenhof-festoj

Mannheim: La Esperanto-amikoj de Mannheim-Ludwigshafen kunvenos okaze de la naskiĝtago de d-ro Zamenhof kaj de la tago de la Esperanto-libro, la 14an de decembro 1974, je la 15a horo ĉe Carl-Duisberg-Gesellschaft, Mannheim, Tattersallstr. 39. Gastoj bonvenaj!

Homburg/Saar: Sarlanda Esperanto-Ligo invitas al Zamenhof-festo en Homburg, Jugendherberge Homburg-Sanddorf, la 15an de decembro 1974, komenciĝo je la 10a horo. El la programo: La rolo de la libro en la historio de Esperanto (Günther Becker); la verko de Zamenhof (Reinhard Hauptenthal).

Hamburg: La Zamenhof-festo okazos vendredon, la 13an de decembro TUS-Heim, Hamburg 26, Von Gräffenstr. 10, je la 19,30 horo.

Esperanto en la radio (pp)

Varsovio: Kiel ni jam informis antaŭe, Pola Radio eldonis sian programfolion por la periodo XI 1974 - V 1975. El tiu informilo ni citas:

"Nia Esperanto-Redakcio, Redakcio de la Pola Radio por Eksterlando, havas jam malantaŭ si la 15-jaran periodon de la ekzistado. Ĝi estas periodo tiom sufiĉa, ke la ĉeeston de Esperanto en la radiofonio oni povu opini fenomenon firma, ekzamenita kaj tute ne efemera.

En tiu ĉi sama, tuta periodo niaj dissendoj trovis sufiĉe grandan aŭditorion, kio cetere estas kondiĉo fundamenta ne nur por la ekzistado mem, sed ankaŭ por la evoluo de tiaspeca entrepreno. Kiel ni orientiĝas, sufiĉan nombron da radioaŭskultantoj (por sia ekzistado) havas ankaŭ la aliaj radiofonioj emisiataj disaŭdigojn aŭ anguletojn en la internacia lingvo.

Tamen Pola Radio por Eksterlando, kiel decas al la patrujo de L. Zamenhof, legitimas sin per la plej granda nombro da emisiataj horoj semajne....."

Pola Radio ĉiutage elsendas ĉiutage tri programojn:

06,00 horo sur ondolongoj 41 m (7270 kc/s), 49 m (6135 + 5995 kc/s)
200 m (1502 kc/s)

16,30 horo sur ondolongoj 31 m (9675 kc/s), (9540 kc/s)
41 m (7145 kc/s)

22,30 horo sur ondolongoj 49 m (6135 kc/s), (5995 kc/s)
200 m (1502 kc/s)

La programfolion oni povas ricevi senpage de Radio Varsovio, Esperanto-Redakcio, P.O.B. 46, PL-00-950 Varsovio 1.

Berno: Ges-roj Gacond malfermis la ĉi-jaran leterkeston, laŭ kiu oni eksciis, ke la Svisa Esperanto-Redakcio ricevis korespondaĵojn el 29 landoj. Ĉi-foje oni ne respondos laŭ la alfabeto de la landoj, sed laŭ temoj. La "babilado" kun la aŭskultantoj daŭros en la venontaj semajnoj.

D-ro Arthur Baur en letero de la 74-11-17 skribis al la redakcio de Germana Esperanto-Revuo: "En numero 6 de GER troviĝas tre interesa kaj cetere tre bona artikolo pri la platdiĉa lingvo kun multaj aludoj al Svislando. Mi intencas dediĉi tutan elsendon al tiu artikolo...."



D-ro Arthur Baur

La svisaj elsendoj okazas:

Lunde kaj merkrede 13,20 - 13,30

Ĵaŭde kaj sabate 21,45 - 21,55

sur ondoj 31,46 m (9535 kc/s)

48,66 m (6165 kc/s)

75,28 m (3985 kc/s)

Adreso: Svisa Kurtonda Radio Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15
Petu la informfolion!

La fotoj montras la parolistojn D-ro Arthur Baur (maldekstre) Claude Gacond (dekstre)

De s-ino Gacond ni bedaŭrinde ne havas foton!



Claude Gacond

Eksterlandanoj en Svislando

Citaĵoj el Esperanto-elsendo de Radio Roma

Ekde jarcentoj, Svisujo estas taksata grandanima kaj malavara lando, kiu volonte gastigas homojn, sendepende de ilia raso, deveno, politika aŭ religia kredo. En la menso de ni ĉiuj estas bildo de Svislando kiel ŝirmanto de ekzilitoj kaj de aliaj homoj, kiuj en sia patrujo ne ĝuas samnivelajn vivkondiĉojn. Neŭtraleco, helpemo al ĉiuj popoloj, persista agado por **interpacigo**, estas karakterizoj, kiuj en nia menso preskaŭ memkompreneble akompanas sin al la nomo Svislando.

Ĉi tiu opinio iom estis skuita de ĵusa evento, kiu specife tuŝas la rilatojn inter Svislando kaj Italujo: nome, estis tie farita referendumo, por decidi, ĉu limigi la nombron de la alilandaj laboristoj (52-procente italoj). Estas vere, ke la propono forpeli el Svislando duonmillionon da "gastlaboristoj" estis malaprobita; sed ĉiun aferon oni povas rigardi el almenaŭ du vidpunktoj; kaj sendube la ĉefa kaŭzo de ĉi tiu malaprobo ne estis humanaj zorgoj pri la sorto de la forpelotaj eksterlandanoj, aŭ principaj konsideroj: Kiel aperas el la komentarioj de la svisaj gravuloj mem, la plimulto e la svisoj voĉdonis kontraŭ la propono ne pro konvinkigo, ke la proponata regulo estas rasisma, sed simple pro timo, ke abrupta foriro de la eksterlandaj laboruloj kaŭzu grandan krizon en la svisa ekonomio. Alivorte, la svisoj decidis teni ĉe si, almenaŭ provizore, la eksterlandajn laborulojn, ne pro amo al la fremduloj, sed...pro amo al si mem, ĉar ili ektimis, ke la abrupta foriro de impona nombro da eksterlandanoj malebligu plian ekonomian evoluon, kaj devigu la svisojn fari ankaŭ tiujn humilajn laborojn, kiuj nuntempe estas plenumataj de italoj, hispanoj, grekoj, turkoj aŭ jugoslavoĵ.....

Nun Svislando devos multe peni, por ke la mondo forgesu ĉi tiun epizodon de ĝia vivo. La plej taŭga maniero por forigi ĉi tiun malagrablan impreson, estus la starto de nova svisa politiko pri gastlaboristoj, kiu alportus pli decajn vivkondiĉojn, kaj liveru al la eksterlandanoj, jam delonge laborantaj en Svisujo, almenaŭ la bazajn homrajtojn.

Italujo rigardas kun aparta intereso al la problemo, ĉar 52 procentoj el la eksterlandanoj vivantaj en Svislando estas italoj. Temas pri ĉirkaŭ 550 mil personoj, kiuj ofte devas toleri plimalpli kaŝitajn formojn de ekspluatado, por konservi sian laborpostenon.

Margene de la referendumo, estas kurioze, ke la plej alta procento de voĉoj favore al laforpelo de eksterlandanoj montriĝas en la germanlingvaj kantonoj de centra Svislando, kie malplej multnombre vivas gastlaboristoj, dum la plej alta procento de voĉoj favore al la pluresto de eksterlandanoj estis ĝuste en la franclingvaj kaj kelkaj itallingvaj kantonoj, kiuj amase gastigas la eksterlandanojn mem.

Ankaŭ tiun ĉi donitaĵon oni povas interpreti en du manieroj. Optimistoj diros, ke tiuj svisoj, kiuj ĉiutage kunvivas kun eksterlandanoj montris estimon al ili, kaj deziras, ke la eksterlandanoj plurestu, ĉar finfine ili bone kondutas. Pesimistoj, kontraŭe, trovas plian konfirmon al sia tezo, ke la propono forpeli eksterlandanojn estis malaprobita nur pro tio, ke oni timis ekonomian malavantaĝon: fakte, en la germanlingvaj centraj kantonoj oni ne devis zorgi pri la ekonomia flanko de la afero - ĉar tie industrioj estas malmultaj -, kaj do oni voĉdonis spontane.

Antonio De Salvo